

## Ĉinio: Pekino elpeladas siajn malriĉajn migrantojn



Du plus du ne ĉiam  
estas kvar

Pandora (ΠΑΝΔΩΡΑ)

Surbrusta tatuaĵo de  
senkonscia viro  
hezitigis kuracistojn

## La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

### Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin  
[Андрей А. Печёнкин]

### Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn,  
en Esperanto, kaj vi verŝajne  
trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas  
iujn enhavojn aŭ samopinias  
kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la  
ligiloj kaj la enhavlisto estas  
alklakeblaj.*



Farita per:



**Scribus**  
Open Source Desktop Publishing

## Ĉinio: Pekino elpeladas siajn malriĉajn migrantojn

*Mortiga incendio en la ĉefurba ĉirkaŭaĵo, estas preteksto al kampanjo de amasa elpelado p. 03*

## Surbrusta tatuaĵo de senkonscia viro hezitis kuracistojn

*“Do not resuscitate” (Ne revivigu) p. 04*

## Du plus du ne ĉiam estas kvar

*Naturterapio p. 05*

## Pandora (ΠΑΝΔΩΡΑ)

*Ĉu povus esti la mondo sen la virinoj? p. 07*

## Hodiaŭe

*Rainer Maria RILKE p. 08*

## Ĉinio: Pekino elpeladas siajn malriĉajn migrantojn

En Ĉinio, mortiga incendio en la ĉefurba ĉirkaŭaĵo, estas preteksto al kampanjo de amasa elpelado de enmigrintoj. Ili estas elpelataj el siaj loĝejoj en rapidega maniero.

«Ni evitu trorapidecon, ni donu tempon al la loĝantaro por evakuiĝi», provis maldramigi la 27-an de novembro TAJ Ki, sekretario de la Komitato de la Komunisma Partio, raportas la komerca retpaĝaro *Pengpai*. Li esprimiĝis dum kunsido dediĉita al la konsekvencoj de la incendio, kiu kaŭzis 19 mortintojn, la pasintan 18-an de novembro.

Nur ses tagojn poste, la aŭtoritatoj de la ĉefurbo esprimiĝis pri tiu temo, kiu emociigis la amaskomunikilojn kaj la sociajn retojn. La operaco pri elpelado komenciĝis posttagmeze de la 21-a de novembro, en pluraj pekinaj ĉirkaŭurbaj areoj. Fotoj de oficialaj afiŝoj, kiuj anoncas la operacon, ekaperis en la sociaj retoj. Legeblis, ke la aŭtoritatoj de la distrikto *Daksing* (suda pekina ĉirkaŭurbo, kie okazis la incendio) postulas «urĝan evakuadon» de la luprenantoj, dum la kvin estontaj tagoj, kaj ke «akva kaj elektra liverado estos interrompita». La tiea loĝantaro spertas panikon. Ĝi estas kvalifikita en la oficialaj dokumentoj de Pekino, kiel «laboristaro je malalta nivelo»



## La elpelado tuŝas plurajn ĉirkaŭurbojn

La sama afero estis anoncita en la distrikto *Fengtaj*, sude de la urbo, dudek kilometrojn for de la centro. En la konstruaĵoj *Ĵinglin*, «en nur du tagoj, mil personoj estas petitaj forlasi siajn loĝejojn», mencias *Duanchuanmei*, komerca honkonga retpaĝaro.

66-jaraĝa virino ŝajnas perdita, staranta antaŭ la enirejo de sia konstruaĵo, rakontas ĵurnalisto. «Ĉi-vespere, ŝi ne foriros. Tiu kamparanino deveninta de *Veifang*, en la regiono Ŝandongo, laboras en Pekino de antaŭ tridek jaroj, kaj havas neniun lokon por iri», daŭrigas *Duanchuanmei*.

Laŭ la ĵurnalo *Apple Daily* de Honkongo, «pli ol 100 000 enmigrintoj perdis siajn loĝejojn, dum malvarmegas, de minus 4 ĝis minus 5°C».

La 24-an de novembro, cent ĉinaj intelektuloj subskribis peticion, adresitan al la centra potenco. Ili protestas kontraŭ la amasa elpelado de la enmigrintoj el la ĉirkaŭurboj de Pekino:

«Granda incendio okazis la 18-an de novembro en *Daksing*, kiu mortigis 19 personojn, inklude de 8 infanoj. La koncernataj servoj de Pekino, anstataŭ pripensi siajn kulpojn kaj renkonti la viktimojn, profitas de tiu tragedio por rapide komenci kampanjon, kiu celas la «migrantojn», modestajn kaj vundeblajn, je



la nomo de prevento de riskoj», diras tiuj intelektuloj.

La amplekso de la elpeladoj ŝokas la ĉinojn, kaj la potenco provas kaŝi la informojn pri tiu temo. Ludo de kato kaj muso okazas en Interreto. La informoj, la blogoj kaj raportaĵoj pri la evakuadoj estas multfoje forigitaj, denove republikigote de la retanoj.

Ŝi Ĝjnping emociĝis fronte al la «homoj, kiuj suferas malfacilaĵojn».

Antaŭ la loĝkonstruaĵo *Kingnjan*, maljuna viro eĉ genuiĝis antaŭ eksterlanda ĵurnalisto, petante de li, ke li plejeble parolu pri tiuj amasaj elpeladoj. «La ĉinaj ĵurnalistoj ne povas raporti», li sin pravigas», atestas artikolo de la komerca retpaĝaro *Haoqixi Ribao* [la nomo neverigita].

Sentoj de forlasado, maljusteco, malespero premas la loĝantaron, kiun Pekino volas kiel eble plej rapide forigi. En video farita en la

distrikto *Daksing*, fare de la artisto HUA Yong, deksepjara virino diras, ke ŝi malvarmas, ĉar hejtado estis interrompita, ke ŝi ne scias kien ŝi povas instaliĝi. «Je mia aĝo, kiu bonvolos luigi al mi loĝejon?» demandas sin tiu virino. «La 19-a kongreso de la [Komunisma] Partio, okazinta en oktobro, estis bonega, la diskurso de la Prezidento Ŝi Ĝjnping [Xi Jinping [ĉi tĉin.p'ŝi 习近平]] pri la neceseco malpliigi la malriĉecon estis trankviliga, sed la lokaj potencoj malobservas ĝin», ŝi bedaŭras.

En sociaj retoj, multaj ĉinoj memorigas la kortuŝan frazon de la Prezidento Ŝi Ĝjnping: «Tiuj plej zorgas min, kiuj spertas malfacilaĵojn». Ĝis nun, Ŝi Ĝjnping eldiris neniun vorton pri tiuj amasaj elpeladoj de malriĉuloj. En Ĉinio, la mortiga incendio en la ĉefurba ĉirkaŭaĵo estas preteksto al kampanjo de amasa elpelado de migrantoj. Ili estas elpelataj el siaj loĝejoj el rapidega maniero.

Neniam Milito Inter Ni


## Surbrusta tatuado de senkonscia viro hezitis kuracistojn

Jen okazintaĵo raportita la 30-an de novembro, de la scienca periodaĵo *“The New England Journal of Medicine”*.

70-jaraĝa viro, sukermalsana, kun historio pri pulmaj kaj koraj malsanoj, alvenis en malsanulejon senkonscia, havante sur sia brusto tatuadon kun jena skribaĵo: *“Do not resuscitate”* (Ne revivigu).

La kuracistoj de *“Jackson Memorial Hospital”* prizorgis la spiradon de la viro kaj sendis la

aferon al etika konsilantaro, kiu rekomendis la obeon al la “peto” sur lia haŭto. Dokumento kun informoj pri la okazintaĵo estis pretigita al departamento pri sano de la subŝtato Florido, kaj vespere de tiu sama tago la viro mortis sen interveno de la kuracistoj.



Intervjue al la gazeto *“The Washington Post”* la kuracisto kaj ĉefa verkisto de la artikolo Gregory HOLT asertis, ke tiu viro estis loĝanta ĉe maljunulejo, sed li estis trovita ebria surstrate.

Li havis nek identigilon, nek familion kaj amikojn, kiuj povus doni al ni pli da informoj.

Paulo Cesar PIRES  
esperanto.blog

## Du plus du ne ĉiam estas kvar

Iu polo, dum 22 jaroj loĝanta kaj laboranta en Aŭstralio kiel inĝeniero, kie li elmigris el Pollando, estas la aŭtoro de libro, pri kio vidu sube ĉe la fino de la artikolo. Estante ankoraŭ en Pollando, antaŭ la dormo, li ne legis tamen librojn pri la konstruado de pontoj sed plej volonte tiujn pri fiziologio. Scii, kiel funkcias la ĉeloj, histoj kaj organoj de la homo ege fascinis lin.

Post la alveno al Aŭstralio, krom labori li decidis komenci studojn pri medicino, sed baldaŭ montriĝis, ke lia universitato klerigis medicinistojn ĉefe tiamaniere, ke ili „vendu” medikamentojn. Ne temis pri tio, ke la medicinisto elektas mem la plej taŭgan en difinita kazo kuracrimedon, sed lia tasko estas rekomendi tre difinitajn kuracilojn.

Li decidis rezigni pri tiuspeca edukado sed medicino plu tiris lin. Li komencis okupiĝi pri naturterapio. Baldaŭ „lia mondo malfermiĝis”, ĉar montriĝis, ke ofte oni povas tre facile kuraci homon sen uzi kemiterapion en la vasta senco de la vorto. La uzo de kemiaĵoj – tute inverse - kreas grandajn problemojn. Jen tiel lia pasio pri naturoterapio daŭras ĝis hodiaŭ. Li konfesas: - Strangege kontentigas min, kiam venas homo, kiu de multaj jaroj ne povas supervenki sian malsanon, ĉar nenio ĝis nun povis helpi al li, kaj jen subite, dum monato aŭ du, tia persono resaniĝas.

Kompreneble, la natura medicino ne estas rimedo kontraŭ absolute ĉio, sed oni devas scii, ke en multaj kazoj, ofte senesperaj, savo ekzistas. Li rememoras, ke dum siaj inĝenierstudoj, iun tagon, dum unu el lekcioj, la gvidanta ĝin doktorino pri matematiko diris al siaj studentoj: - De hodiaŭ vi rigardos matematikon per tute aliaj okuloj. Ekde nun du plus du povas esti kvin, povas esti nul... Ne estis facile kompreni tion, sed ŝi iom post iom pruvis, ke du plus du ne devas esti kvar, ĉar ĉio dependas de la maniero rigardi la demandon.



„Du plus du estas kvar” estas nur aparta kazo de matematiko. Simile estas en medicino – atentigas la pola inĝeniero, kiu dum pli ol

dudek jaroj sukcesis tralegi kaj trastudi milojn da sciencaj prilaboraĵoj kaj esplorrezultoj. Laŭ li granda naiveco estas atendi, ke kiam oni aplikas kemiaĵon, kiu estas fremda por la organismo, artefarita substanco, ke ĝi povas esti la anstataŭaĵo de iu natura substanco, kiu ĝuste mankas al ni. Tio ne povas helpi, kaj fakte ne helpas, pri kio atestas miloj da pacientoj prenantaj sintetikaĵojn sen la kontentiga rezulto, kiu estas plena resaniĝo. T.n. kronikaj, longedaŭraj malsanoj en multaj kazoj estas plene resanigeblaj sen uzi sintetikaĵojn, sed plej bone „sub la okulo” de kuracisto.

La konkludojn de siaj multjaraj studoj li priskribis en du libroj, kie li listigas la ekzistantajn sciencajn prilaboraĵojn kaj milojn da kazoj, kiuj pruvas la efikecon de pluraj naturaj substancoj, facile

atingeblaj, multe pli malaltprezaj. Tamen la substancoj, ties formoj kaj kvantoj devus esti aplikataj de kuracisto, kies scio estas necesa, garantias sekurecon kaj per tio kondukas al resaniĝo sen kromefikoj, kiujn plurkaze elvokas sintetikaj, do malpli aŭ pli toksikaj „kuraciloj”.

En la historio ekzistis kaj plu ekzistas kuracistaj specialistoj, kiuj elprofitis kaj plu elprofitas tiujn naturajn, amikajn rimedojn, kun la sukceso multe pli granda ol tio okazas en pluraj abunde financataj ŝtataj hospitaloj. Iliaj sukcesoj tamen troviĝas en iu ombro de forgeso, kvazaŭ bone kaŝita mistero, nekomprenebla por ni, kiuj suferas malsanojn anstataŭ ĝui la vivon. La aplikado de kelkaj ekstersistemaj sed pli efikaj metodoj estas iom riska bedaŭrinde, ĉar ligiĝas kun la perdo de grandegaj profitoj de farmacikonzernoj. La riskuloj ofte devas agi kaŝeme, por ne perdi laborpostenojn, bonan nomon kaj eĉ... propran vivon. Sed por ili nia vivo, nia sano pli valoras ol ĉio.

Kiel estis menciite komence, mi volus rekomendi al vi la libron, kies la unua volumo aperis kaj estas legebla en kelkaj lingvoj (pola, angla, germana, itala, ĉeĥa). La dua volumo – nur pole, estas la kompletigo de la unua. Ĝi entenas multajn fakajn indikojn por kuracistoj. Ĝi ĵetas tre optimismigan lumon al nia sano, sed por ĉi sanon konservi aŭ reatingi estas necesa nia konscio, antaŭ ol la hodiaŭa mondo kunigos fortojn, por kontraŭbatali la malsanojn, agnoskatajn kiel nekuraceblajn.

La libro estas titolita „Kaŝitaj terapioj” kaj ĝi ne koncentriĝas je la sendube

sukcesa medicino de t.n. „akraj kazoj”, ekipita per la moderna kirurgia kaj diagnostika aparataro, sed ĝi estas dediĉita al t.n. nekuraceblaj kaj longdaŭraj malsanoj. La ĉefa transsendo de la libro estas, ke **ekzistas nur unu medicino – tiu, kiu estas efika!** Kaj la efika ĝi estas nur tiam, kiam ĝi alkondukas al tiu situacio, kiam oni permesas agi al la naturo mem, forigante ĉion, kio la procezon de memresaniĝo de nia organismo malhelpas. Rezulte de ajna ago, la „lasta vorto” apartenas al la naturo.

Ĉi-sube vi trovos la ligilojn al koncernaj retpaĝoj. Pleje gravas, ke ni rigardu la eblecojn de ajna medicino per tute aliaj okuloj, ol faras tion televido, reklamoj kaj diversaj bone financataj kaj titolitaj personoj, ripetantaj persiste: - Du plus du estas kvar! Sed kiel ni scias, ne ĉiam. Gravas, ke al tiu nova, malfermita rigardo al medicino aliĝu niaj kuracistoj. En la libro, oni povas trovi la titolojn de prilaboraĵoj kaj esploroj de diversaj spertuloj pri medicino. Mi volus substreki, ke la rolo de niaj kuracistoj estas neanstataŭigebla, ĉar ni, pacientoj, esperas ilian fakan kaj zorgeman gvidadon dum nia saniĝo. Nur la elekto de la plej ĝusta kuracmetodo, post la konsciiga konsilo de bona kuracisto, restu nia rajto!

[hiddentherapies.com](http://hiddentherapies.com)

[timeforvitamins.com](http://timeforvitamins.com)

[ukryteterapie.pl](http://ukryteterapie.pl)

Andreo BACH  
Esperanta Retradio



## Pandora (ΠΑΝΔΩΡΑ)

Ĉu povus esti la mondo sen la virinoj? Ĉu povus esti en la mondo amo, amoro, ĝojo, prospero sen virinoj? Kompreneble ne kaj ne kaj ne, kompreneble nenio povus esti en la mondo, precipe sen la homa, nu, sen la virina beleco!

Kontraŭe al la difarita, natura, unika, tamen senanima belo, devis stari la same unika beleco de la diversspeciaj vivuloj. Estas pruvite de la abundo da seneraraj praaj mitoj kaj historioj, ke sola kontraŭpezo de la natura belo estas la vivula, ĉefe la homa beleco.

Mi jam diris, ke tiu homa karakterizaĵo, la beleco, apartenas al la virinoj; al la viroj apartenas alia, preskaŭ same signifa karakterizaĵo, la forto, la korpa, ne la mensa, forto.

Estas sciate, ke la antikvaj dioj, ĉu por ludi, ĉu por eviti la enuon, kreis la homojn, tamen ŝajnas, ke, post nelonge, la kreintoj komprenis, ke iliaj kreitaĵoj iompostiome komencis, almenaŭ sentimentale, influi ilian dian rezoneblon. En la komenco, la unu post la alia, viraj kaj inaj dioj, duondioj, diidoj kaj ĉiaspecaj diaĵoj komencis enamiĝi al belaj mortemuloj kaj mortemulinoj. Tio ŝajnis agrabla, gajiga, distra, eĉ interesa “okupo”, tamen sekvis kelkaj komplikaj, ĉar gedioj naskis kaj generis mortemajn idojn kaj tio post nelonge kaŭzis kontraŭiĝojn, konfliktojn eĉ kverelojn en la ordinare trankvilaj diaj restadejoj. La afero iĝis vere danĝera, kiam kelkaj dioj komencis montri apartan intereson, eĉ amon, ne al siaj propraj mortemaj idoj, sed al la tuta homa gento. Tio, kompreneble, ne povis resti ekster la atento de la direĝo Zeŭso (Ζεύς), kiu ne povis toleri tian konduton.

La afero eksplodis, kiam Prometeo (Προμηθεύς), unu el la Titanoj (Τιτάνες), ĉu pro amo al la homoj, ĉu pro malamo al Zeŭso, la venkinto de la Titanoj, ŝtelis de Hefesto (Ἥφαιστος) la fajron kaj de Atena (Αθηνά) la saĝecon kaj kaŝe donacis

ĉion tion ĉi al la homaro. Tiu kontraŭzeŭsa ago estis fatala por Prometeo, sed ankaŭ por la homaro. La trudita puno al Prometeo estis eksterordinare senindulga, tamen ankaŭ la puno de la homoj estis same severa.


Pri Prometeo eble mi parolos per alia artikolo, nun mi pritraktas la suferojn de la homoj, kaŭzitajn de la dia puno.

Notinde, ke ĝis tiam, en la homa mondo regis plena paco kaj sereneco, ĉar la homoj (probable nur viroj) ĝuis ekskluzive bonaĵojn. Ĝis tiam, ideo pri malbono ne estis; la homoj vivis en la medio de tio, kion, multe pli poste, oni nomis “paradizo”.

Jen, do, kion faris Zeŭso. Li unue ordonis Hefeston, knedi el argilo, diindece belegan virinon. Poste, li donis vivon al la vere belega dia faritaĵo, kaj tiele naskiĝis, pli ĝuste, venis en la mondo, Pandora, la unua vera virino (laŭ aliaj la unua virino). Mi preferas la nomon “vera virino”, ĉar Zeŭso ordonis al ĉiuj diinoj, inspiri al Pandora, estigi en ŝia menso, animo kaj korpo ĉiujn siajn proprajn karakterizaĵojn, ecojn, inklinojn, talentojn, ĉion diinan!

Ĉu ĉar ŝi ricevis ĉiujn donacojn de la diinoj, ĉu ĉar ŝi alportis al la homoj ĉiujn diajn donacojn, Pandora ricevis sian nomon, ĉar en la helena lingvo “pan” (παν) signifas “ĉio” kaj “doro” (δῶρον) signifas “donaco”.

Do, la per ĉio dotita virino estis kondukita de Hermeso (Ερμής) al la homa mondo, tamen,



portante ankaŭ en fermita skatolo (eble korbego) la senditajn de Zeŭso donacojn al la homaro; tio estis la valora bagaĝo de Pandora.

Tiuj donacoj estis ĉiuj malbonaĵoj, ĉio, kio ĝis nun turmentas kaj eterne turmentos la homan specion. Estis malsanoj, doloroj, suferoj, estis malĝoj, ĉagreno, estis malkonsentoj, malamo, perforto, milito, morto, estis ĉio tia!

Pandora, ne sciante kion ekzakte alportis al la homoj, malfermis plenĝoje sian skatolon por montri la donacojn al siaj egaluloj kaj tiam ĉio elĵetiĝis, elfluis kaj etendiĝis en la tutan homan mondon, do, en nur unu momento ĉio estis farita!

Tamen, oni diras, ke la pli danĝeraj, la kaŝitaj kaj plej fatalaj “donacoj” de Zeŭso estis la ecoj inspiritaj de la diinoj al Pandora kaj de tiu lasta al ĉiuj ceteraj virinoj, tiamaj kaj ĉiamaj. Mi klarigu ke temas pri diversaj objektoj. Estas ja la ĉarmo, la beleco, la amemo, la prudento, la sindonemo, tamen ankaŭ obstino, envio, ruzeco, artificeco, ĵaluzo, venĝemo, estas tio kaj alio, tamen, oni pardonu al mi ke mi ne povas paroli pri pliaj tiaj virinaj ecoj, ĉar, kiel sudulo, mi multe amas la virinojn. Mi nur diros, ke Pandora alportis senvole al la virinoj, do al la tuta


homaro, tre utilajn sed ankaŭ tre danĝerajn, eble ankaŭ kelkajn terurajn donacojn.

Mi aldonu ankaŭ ion kuraĝigan, ke en la fundo de la fatala skatolo de Pandora restis nur io, eble de alia, nekonata mano, ne de la mano de Zeŭso, metita, io treege signifa, kaj tio estas la espero, armilo tre forta kaj valora por la homoj.

Kaj por kunligi mian rakontadon kun ĉio dirita en la komenco pri la virinoj, mi diru, ke, eble pro tiu donacportanta Pandora, kompreneble tute maljuste, multaj akuzas pri ĉio la virinojn, la tutan virinan sekson. Memoru, ke laŭ antikvhelena popoldiro, ĝis nun uzata en mia patrujo, la tri plej danĝeraj objektoj en la mondo estas “fajro, virino kaj maro” (πυρ, γυνή και θάλασσα), kaj se mi ĝuste scias tion, preskaŭ similan sencon havas tiu franca kaj vere internacia “chercher la femme” (serĉu la virinon).

Tamen, ĉio tio ĉi estas superflua stultaĵo, ni lasu la virinojn trankvilaj, ni diru, ke pri ĉio kulpas Pandora!

Spiros SARAFIAN  
Turka Stelo, n-ro 24



## Rainer Maria RILKE

**Rainer Maria RILKE** [rajne maria rilke], realnome: **René Karl Wilhelm Johann Josef Maria RILKE** (naskiĝis la 4-an de decembro, 1875 en Prago, mortis la 29-an de decembro, 1926 en *Val-Mont* apud *Montreux*, Svislando) estis aŭstra poeto.

**En Esperanto aperis: *Printempigo; Aŭtuna tago; La pantero; Amkanto; La kanto pri amo kaj morto de la flagisto Kristof Rilke.***

**Vikipedio**